All affairs connected with the General Secretary's Office have been transferred to the new address and personnel in New York. Now I am stepping aside as your long-time "Office Boy." My sole concern has been, and will be, for ESPERANTO as the logical and only living auxiliary language in the world. I am happy in the sure belief that I am leaving the Central Office of EANA in the hands of enthusiastic, qualified and capable people, who will hold high our banner for ESPERANTO.

—JOSEPH LEAHY, *Past-Secretary*

TO THE MEMBERS OF E. A. N. A.

It is with sincere gratitude, yet mindful of tremendous labors and responsibilities, that I greet you as your General Secretary. By your votes I have received a most encouraging expression of confidence, along with all other members of the 'estraro.' Never was there a better time for the practical promotion of *ESPERANTO*. On this one supreme and neutral objective all of us can learn to work together in harmony.

Quite naturally, there are many cross-currents and special interests which strive for emphasis in our councils and official organ "AE." I take it that the General Secretary must sincerely try to serve *ALL* legitimate interests, yet hold courageously to the main current of absolutely neutral promotion and application of Esperanto, as directed by the official purposes of E.A.N.A.

Only those intimately acquainted with the problems of the Central Office can appreciate the difficulties. Considering my predecessor, *Joseph Leaby*, and his long and faithful service against tremendous odds, I stand humble and with profound respect for his sacrifice and service. Looking backward over issues of "AE" since 1910, I find again and again pleas from the various Secretaries for patience and understanding relative to the labors. *May I repeat the old refrain!*

Let us unite on the one all-important objective—the promotion and application of *ESPERANTO*. Let us increase our support, financial and moral, for E.A.N.A. and "AE," to the end that we have an effective organization and a powerful organ to serve *ALL* interests until we reach sure and solid recognition by the public agencies of America. If we are to succeed, we must present but *ONE* interlanguage (Esperanto) to the public. By the same token, we must not dissipate our moral and financial strength, but pool our slender resources *for those aims we all have in common*. In that spirit, and with those principles, I will labor for E.A.N.A. In the words of the poet, Louis MacNeice (*'Springboard'*—*Poems*) 1941-44, entitled "Babel":

Patriots, dreamers, die-hards, theoreticians, all,
Can't we ever, my love, speak in the same language?
Or shall we go, still quarreling over words, to the wall?
Have we no aims in common?

— G. ALAN CONNOR, *Gen. Sec'y EANA*

CERTIFICATION RE 1945 ELECTION: The results were practically unanimous, 151 votes for each candidate (the exception being 150 votes for Vice-President). Miss Orloff, our former Vice-President, who had declined further office because of other important activities, received one write-in vote. We briefly summarize the list of officers to save space: *Dr. Cecil Stockard*, President; *Robt. Karlson*, Vice-President; *G. Alan Connor*, Gen. Sec'y; *Doris T. Connor*, Ass't Sec'y; *E. A. Knight*, Treasurer; *Joseph Leaby*, Member Exec. Comm. The complete certification, signed by official tellers, Mrs. Wm. H. Galand and Anne M. Leahy, is on file at Central Office.

MEMBERSHIP & SUB RENEWALS: From now on renewal slip will be found only in last issue of your subscription series. Immediate renewal, upon receiving this slip, will greatly facilitate the work of the "AE" staff.

VERDA STANDARDO—MALGRAŬ HITLER

Laŭ "PACO KAJ JUSTECO", Bruĝo, Belgujo

Dika pakajo alvenis per la poŝto. La poŝtmarkoj montris, ke ĝi venis el liberigita Belgujo. Malfermante ĝin, ni trovis, ke ĝi enhavis numerojn de Esperanto-gazeto, kiu aperis en Bruĝo (Brugge) sub la Nazi-okupado. Tiuj numeroj de "Paco kaj Justeco" sendube estas kaj restos gravaj dokumentoj pruvantaj la nevenkeblan vivoforton de Esperanto. La gazeto aperis tute regule ĉiumonate ĝis la liberigo de Belgujo. Ĝi ankorau aperas ĉiumonate kun tre interesa enhavo. La bele presita kovrilo montras simbole du manojn unuigitajn en forta manpremo—"Paco"—, pesilon—"Justeco"—kaj la Kvinpin-tan Stelon. Malgraŭ Hitler kaj la Nazi-tiraneco, en Bruĝo, tiu malnova kaj bela flandra urbo, estis homoj, kiuj neniam perdis sian kredon je paco kaj justeco kaj iuj alte tenis la verdan standardon.

Kiam la pioniroj en Bruĝo komencis la danĝeran laboron de ĉiumonata publikigo de Esperanto-gazeto, ili bone konis la finan malsukceson de alia "subtera" Esperanto-gazeto en Belgujo. En 1941 Flandra Ligo Esperantista eldonis kvin bele presitajn numerojn de "Flandra Esperantisto." La sesa numero jam estis en la presejo, kiam la Gestapo flaris ion; la 25an de Novembro 1941 Gestapo-agentoj frapis je la pordo de D-ro Theo Van Gindertaelen, Prezidanto de FLE. Severa "esploro" de liaj "krimoj" komenciĝis. Flandra Ligo Esperantista estis devigata ĉesigi ĉiun laboron. Tamen poste Flandra Esperanto-Instituto revigliĝis kaj vendis—malgraŭ Hitler—grandajn kvantojn da Esperanto-libroj. Ĝi eĉ presis novan katalogon. Malgraŭ la neebleco replenigi la stokon, la Instituto vendis dum la milito librojn je tuta kosto de 75,000 frankoj (laŭ nuna kurzo 1,700 dolaroj). En Bruĝo dum tiu tempo la pioniroj de "Paco kaj Jus-

teco," ekzemple D-ro Fernand Roose, Fons Norro, Roger Iserentant, vikle laboradis. Niaj legantoj nun estas invitataj sekvi tiun laboron helpe de mallongaj elĉerpaĵoj el la numeroj de "Paco kaj Justeco."

La 12an de Majo 1940 la XI-a Kongreso de Flandra Ligo Esperantista estis akazonta en Bruselo. La prezidanto kaj la sekretario de "Paco kaj Justeco" jam pretigis siajn valizojn, esperante pasigi kelkajn agrablajn tagojn en la ĉefurbo. Sed la 10an de Majo, kiel fulmotondro el blua ĉielo, la milito venis al Belgujo. La katastrofo ŝajnis neniigi la vivon de la Esperanto-grupo, sed ne por longe. Jam en Julio la membroj kunvenis denove kaj rekomencis la biciklo-ekskursojn, kiuj ĉiam ludis grandan rolon en la grupvivo. En la aŭtuno—malgraŭ Hitler kaj la milito—Esperanto-kurso komenciĝis.

En 1941 okazis ĉiusemajnaj grupkunvenoj kaj unufoje en ĉiu monato "amuza vespero." "La estraro intencis, malgraŭ la okupado de nia lando, vikle daŭrigi la laboradon kiel kutime dum normalaj cirkonstancoj. . . . Tamen la estraro ne kontentigis pri la manko de intereso de la plej granda parto de la gemembraro, kiu nur tre malregule ĉeestis la kunvenojn. Aŭ ĉu la kaŭzo estis la timo pro la malhelo kaj ŝirmpafado kontraŭ malamikaj flugmaŝinoj anstataŭ manko de intereso? Dum la monato Marto ni feliĉe povis sciigi al niaj gemembroj la reaperadon de kelkaj Esperanto-revuoj, kiel i.a. la konata 'La Praktiko.' . . . Meze de Majo atingis nin la sciigo pri la malpermeso en Nederlando de la agado de ĉiuj societoj kun internacia tendenco. Nia movado per tio ricevis teruran baton, ĉar Holando iĝis (post germanigado de Aŭstrujo) la 'Verda Paradizo' . . . Plej frapanta afero dum Junio estis la intensa Esperanto-propagando fa-

rita de niaj junaj kamaradoj Gr. Maertens kaj E. Debaets en ilia lernejo. . . . Ni ankaŭ starigis ŝakklubeton, literaturklubeton kaj projektis ankoraŭ aliajn. Kompreneble ĉiuj tiuj klubetoj estas kaj restas subsekcioj de nia Esperanto-Grupo 'Paco kaj Justeco,' kaj oni ilin nur starigis celante tiamaniere teni geamatorojn de tiuj diversaj ludoj kaj sportoj en nia propra rondo."

En la jaro 1942 "nia unua kunveno (laborkunveno) okazis la 8an de Januaro. La ĝenerala jarkunveno, laŭ kutimo kaj statutoj, estis decidata por la 15a de Januaro. Neniu pensis je tiu momento pri la fakto, ke neimagebla malvarmeco kaj ankaŭ la manko de karboj, kiu malebligis al ni varmigi la ejon, ĉesigus de la 12a de Januaro ĝis la 15a de Marto ĉian aktivecon. Neniam antaŭe en la historio de nia grupo (kaj je tiu momento ni ja ekzistis jam de kvin jaroj) okazis tiel longtempa senaktiveco. Feliĉe deko da gemembroj (ŝakamatoroj) tamen regule kunvenis dimanĉe en la trinkejo de nia Esperanto-domo. . . . Fine de Marto, je propono de la sekretario, la geanoj en kunlaboro dum la semajnaj kunvenoj komencis la tradukadon en la mondlingvon de la konata verketo de F. Timmermans: 'La tre belaj horoj de Fraŭlino Simforozo.' La grupvivo denove floradis kaj ni aŭdis diversajn paroladojn pri interesaj temoj. . . . Nia grupo por la unua fojo ankaŭ organizis Esperanto-kurson dum la somermonatoj. Kvankam tio ne estas kutima kaj eĉ estis iom riska, ĉar la kurso okazis dum la libertempo de la lernejoj, ĝi malgraŭ ĉio sufiĉe sukcesis kaj rekompencis la penadon de la estraro."

"Paco kaj Justeco" daŭrigis sian laboron, kvazaŭ la germana okupado, la Gestapo, la malsato kaj la izoleco de la ekstera mondo ne ekzistus. Oni ja rimarkas en la numeroj aludojn

pri diversaj nenormalaj cirkonstancoj, ekzemple la manko de manĝaĵoj, de kafo, de radringoj por bicikloj, de karboj kaj — ĉefe! — de libereco. Politika kritikado tamen ĉiam estis nereakta, subkomprenata. La gazeto publikigis multajn artikolojn pri la ideoj de D-ro Zamenhof, pri internaciismo, pri antikva greka filozofio, pri gramatiko kaj stilo de Esperanto. La tuta spirito de "Paco kaj Justeco" estis radikale kontraŭa al la barbaraj Nazi-teorioj pri "supera raso" kaj la rajto de unu nacio regi la tutan mondon.

Eĉ la bona humoro ne mankis en la "subtera" gazeto. "Randi" publikigis en diversaj numeroj "rakontojn vere verajn" sub la titolo "Kun kontrolistoj sur la vojo." Jen unu el liaj anekdotoj: "En la vagonaro de T. al B., je iu stacieto, surgrimpas homo, kiu kunportas du neregulformajn sakojn. Li ŝovas ilin sub la benkon kaj sidigas. La kontrola brigado dume inspektas kaj fine venas al nia vagonparto. Unu kontrolisto laŭte krias: 'Neniu havas kontrabandaĵojn?' Ĉiuj kapneas, sed nia sinjoro rekrias: 'Jes, mi—du ŝinkojn mi havas! Mi sidas sur ili.' Ĉiuj ridas, ankaŭ la kontrolisto. 'Mi komprenas,' li diras, irante al alia vagonparto. Alvenante en la lasta stacio, la sinjoro prenas la du ŝinkojn de sub la benko kaj malaperas en la amaso."

Kelkaj el la plej aktivaj membroj, ekzemple Gregoire Maertens, "propagandoĉefo" de "Paco kaj Justeco," estis en 1943 inter tiuj belgoj, kiujn la germanaj aŭtoritatoj forsendis al Germanujo por deviga laborado. Tamen la agado de "Paco kaj Justeco" neniam ĉesis: ĉiusemajnaj kunvenoj, kursoj en la vintro kaj en la somero, ĉiumonata gazeto—ĝis la liberigo de Belgujo. Nun la grupo, kiu alte tenis la verdan standardon, kiam la svastiko ŝajnis triumfi, denove fiere laboras antaŭ la okuloj de la publiko.

LA FAMILIO ZAMENHOF EN VARSOVIO

D-RO STEPHEN ZAMENHOF

Jen estas lastatempa novaĵo pri la familio Zamenhof. Ni presas parton el letero ĵus ricevita de D-ro S. Zamenhof, nevo de la majstro. D-ro S. Zamenhof nun loĝas en Nov-Jorko.

. . . Mi ĵus ricevis korespondaĵon de Varsovio (datumita en Marto, 1945). Ĝi informas nin ke *S-ino Wanda Zamenhof*, edzino de Adam (filo de D-ro L. L. Zamenhof), kaj ŝia juna filo Ludoviko (nepo de D-ro L. L. Zamenhof) ankoraŭ vivas, kaj troviĝas en Varsovio. La adreso estas: *Lowicka 39a, Mokotow, Warsaw, Poland.*

Mia kuzino, F-ino Roma Zamenhof (nevino de D-ro L. L. Zamenhof) sendis la korespondaĵon. Ŝi loĝas kun la familio en Varsovio. Ŝi mencias kelkajn aliajn gekuzojn en Varsovio, *sed ne troviĝas eĉ unu vorto pri Lidja Zamenhof aŭ la fratino Sofia.*

Pri Adam Zamenhof, filo de D-ro L. L. Zamenhof, li estis mortigita en Germana malliberejo frue en la komenco de la milito. Ni jam scias pri liaj suferado kaj murdo. Povas esti

ke Lidja loĝas en alia urbo, sed ŝajnas neeble ke la familio en Varsovio ne scius pri ŝia sorto. Pro tio mi havas nenian esperon ke ŝi nun vivas.

Kiel vi jam scias, la popolo de Varsovio malsatas kaj mankas vestaĵoj. Ni sendas pakaĵojn regule al la Varsovia adreso, sed kompreneble unu, du maloftaj pakaĵoj ne longe sufiĉas. Eble la Esperantistoj de Ameriko tre volonte helpos la 15-jaran nepon de D-ro L. L. Zamenhof, nome Ludoviko kaj lia patrino. La pakaĵoj (manĝaĵoj kaj vestaĵoj) povas esti senditaj pere de:

World Jewish Congress, 1834 Broadway, N. Y., aŭ National Organization of Polish Jews, 214 W. 92 St., New York, N. Y.

Sendube Esperantistoj en aliaj landoj, speciale Svedlando kaj Svislando interalie, ŝatus helpi pere de landaj Judaj Organizo, aŭ rekte se eble. . .

RECENZO : "KIU ESTAS KIU EN USONO"

KIU ESTAS KIU Inter Usonaj Esperantistoj. (62 pp. \$1, havebla ĉe Amerika Esperantisto.) Kompilita de Kapitano Post, Route 5, Little Rock, Ark., U.S.A. Jen nova esperantista adresaro kiun oni tralegas kun plezuro kaj akceptas kun danko. Ne estas facile kolekti tiom da adresoj kaj biografietoj, ĉar ne ĉiuj esperantistoj estas membroj de la nacia asocio, aŭ eĉ de lokaj grupoj; krom tio, ne ĉiuj estas pretaj kunlabori. Kapitano Post tial bone sukcesis, kaj pro lia malfacila laboro ni ŝuldas al li grandan dankon. En la libro oni renkontas malnovajn amikojn kaj notas kun korostreĉo ke

ili ankoraŭ laboras por Esperanto. Fideleco de la malnovaj esperantistoj estas stimulo por la novaj.

Bedaŭrinde, la libro enhavas erarojn, sed ili sendube malaperos en dua eldono. Tiuj eraroj estas gramatikaj kaj stilaj. Kiam dua eldono estos bezonata ni esperu ke Kapitano Post transdonos la manuskripton al la Literatura Fako de la Amerika Esperanto-Akademio, kies devo ja estas kontroli manuskriptojn. La aprobo de la Akademio, kiel ankaŭ de E. A. N. A., oficialigus la libron kaj tiel aldonus al ĝia graveco.

— LEHMAN WENDELL.

ESPERANTO-RAPORTO DE SVISLANDO

D. TROESCH

La plej viglaj grupoj en la neŭtrala movado de Svislando estas Bern, Thun, Zurich, St. Gallen kaj Basel. Kelkaj grupoj vivetadis kvazaŭ sur la papero dum la milito, sed tre verŝajne estos baldaŭ ĝenerala reviviĝo kiam rilatoj plene reostos. Esperanto estas afero kiu preskaŭ perdas sian sencon kiam ĝi estas enŝlosita enlande dum jaroj. Nur la plej fortaj esperantistoj povis daŭrigi la agadon dum la plej nigraj jaroj, ĉar ili antaŭvidis la finan liberiĝon kaj la revenon de internaciema tempo, la tempo kiu nun komenciĝas. De regule aperantaj gazetoj en Svislando estas du: *Svisa Espero* (oficiala organo de Svisa Esperanto-Societo) kaj *La Semanto* (bulteno de laboristaj esperantistoj).

Alia novaĵo kiu interesos vin en Usono: Laŭ informo de la Svisa Telegraf-Agentejo, la Ŝtata Konsilantaro de la Kantono Neuchâtel nomis Profesoron Edmond Privat, Profesoro de anglaj lingvo kaj literaturo ĉe la Universitato de Neuchâtel. D-ro Privat, kiu estas tre konata tra la tuta Esperanta mondo pro siaj jam klasikaj verkoj pri la vivo de Zamenhof kaj la historio de la lingvo Esperanto, ĝis nun instruis en la Kantona Komerca Lernejo en Bellinzona.

La *Nova Komerca Lernejo* en Bern (Neue Handelsschule Bern) *enkondukas Esperanton*. La 20-an de Aŭgusto la Nova Komerca Lernejo, sub la direkto de D-ro Leo Schermann, malfermis sian unuan kurson de Esperanto. En la prospekto dissendita antaŭ la komenco de la kurso, D-ro Schermann skribas: "Kvankam la Nova Komerca Lernejo ne prenas pozicion rilate al diversaj proponoj por solvi la 'lingvan problemon,' ni estas tamen sufiĉe progresemaj por rekoni jam ekzistantajn faktojn. Por ĉiam kreskanta nombro da homoj en ĉiuj landoj kaj kontinentoj, ne

ekzistas plu lingva problemoj nek lingvaj muroj. La movado por la enkonduko de la internacia helplingvo Esperanto disvolviĝis en la 60 jaroj de sia ekzistado tiel ke ĉiam pli da homoj en la tuta mondo prizorgas sian tutan eksterlandan korespondadon en tiu simpla facile lernebla lingvo." Certe estus bonege se multaj samideanoj en Usono skribus poŝtkartan gratulon al D-ro Schermann pro lia progresemo. (Adresu: *D-ro Leo Schermann, Neue Handelsschule Bern, Wallgasse 4, Bern.*)

Kaj alia novaĵo estas la fondiĝo antaŭ kelkaj monatoj de nia societo *Svisa Internacia Servo* kun la du celoj: (1) helpi la Esperanto-movadon en Svislando per artikoloj en la naciolingvaj gazetoj, ktp; kaj (2) meti nian lingvon je la servo de ne-esperantistoj. Por realigi la duan punkton *Svisa Internacia Servo* tuj aliĝis al IEL kaj agos kiel peranto por Svisaj firmoj kaj privat-personoj kiuj ankoraŭ ne scias Esperanton sed bezonas helpon de eksterlando. Per konkretaj servoj, ĝi intencas montri al la ĝenerala publiko la utilecon de Esperanto. Unu el la pluraj taskoj de la *Servo* estas peradi verkaĵojn belliteraturajn kaj raportaĵojn inter verkistoj en Svislando kaj aliaj landoj. Kun la reveno de paco, venis la momento starigi tian interŝanĝadon sur solida bazo. Ni esperas ke vi povos helpi nin kontakti profesiajn aŭ amatorajn verkistojn kiuj ŝatus partopreni tian interŝanĝadon kun ni. Precipe ni deziras ricevi mallongajn rakontojn kaj ankaŭ priskribojn pri vialandaj kaj lokaj aferoj, folkloro, kultura, ktp, kiujn ni povas traduki kaj publikigi en svisaj gazetoj. Ankaŭ fotografiaĵojn kun akompananta teksto ni interŝanĝas. Sendu (esperante aŭ angle), kaj petu informon ĉe: *Svisa Internacia Servo, Hallerstrasse 16, Bern, Svislando.*

“SUZI”

GEORGE S. RAYMOND

Jen estas eta bonhumora rakonto de tre lerta Ĉe-metoda kur-
sano. *S-ro Raymond* partoprenis en Ĉe-kurso de Doris Tappan
Connor. Ni atendas pli de lia plumo.

En nia domo ni havas ban-kuvon. Ĝi estas granda, blanka kaj kelkfoje glita! Ankaŭ ni havas katinon, kiu estas la patrino de du belaj katidoj. Ankaŭ ni havas infanojn.

Hieraŭ vespere okazis ke unu el la infanoj enlitiĝis kaj lasis la ban-kuvon duonplena da akvo; kaj la katino, tre ruza besto, kaŝis sin kiam venis la tempo por iri al ŝia lito, kaj, kvankam ĉiuj vokis ŝin, neniu povis trovi ŝin. Tial ŝi povis dormi en la domo anstataŭ en la ĉevalejo, kie ŝi devus dormi.

Tio estus sufiĉe bone, sed je la mateno, tre frue, Sinjorino Katinino soifis kaj kaŝvadis ĉirkaŭe por serĉi ion por trinki. Ne trovante lakton sur la tablo, nek

akvon ie en la kuirejo, ŝi suprensaltis kaj ektrovis la akvon en la ban-kuvo.

Tiun matenon, kiel ĉiumatene, mi leviĝis frue; tial mi vidis tion kion ŝi faris. Tre malsaĝe ŝi penis stari sur la rando kaj trinki el la ban-kuvo. Ŝiaj akraj ungoj, utilaj por grimpi arbojn aŭ kapti musojn, ne konvenis por alkroĉiĝi al tia glata ebena. Kompreneble, ŝi enfalis, la kompatinda kreito, kaj mi, pardonu min Dio, mi ridis!

Sed mi vere kompatis ŝin, kaj mi permesis ke ŝi sidu en nia plej bona seĝo dum ŝi sekigis sian felon, ĉar mi tre multe ŝatas ŝin. Ŝi estas gracia, kaj ŝia nomo estas “Suzi.” Unufoje, mi konis tre belan fraŭlinon nomitan “Suzi”!

Friendly Tips for Students:

1. In Esperanto, the word *si* is a reflexive pronoun for the third person. It always refers back to the subject of the verb: *Ŝi (la katino) kaŝis sin.* (She hid herself.) *Ŝi sekigis sian felon.* (She dried her own fur.) Remember: You never use *si* as the subject of the verb.
2. Today's Special: Notice the sentence . . . *la infanoj lasis la ban-kuvon duonplena da akvo.* (. . . the children left the bathtub half-full of water.) *Ban-kuvon* has the “-n” accusative, but *duonplena* does not! *Duonplena*, here, is a predicate adjective, indicating the condition in which the object is found, with a form of the verb *esti* (to be) understood. We never use “-n” after *esti*! The complete sentence would be: . . . *lasis la ban-kuvon (tiel ke ĝi estis) duonplena da akvo.* And note the different meaning of . . . *lasis la duonplenan ban-kuvon.* (. . . left the half-filled bathtub.)

PROponu Esperanton!

Projekto por Inter-Eŭropa Radio: En la "Schweizer Radio-Zeitung," 1-an Julio 1945, aperis novaĵo pri projekto kiu celas la starigon de inter-Eŭropa reto de radio-sendo-stacioj. "La iniciantoj de tiu plano estas A. W. L. Hubert, Prezidanto de la 'International Radio Maritime Committee,' kaj P. P. Eckersley, Eks-Ĉefingenero de la 'British Broadcasting Corporation.' Pli grandigon de la Eŭropa reto formus mallongonda sendostacio-centro en la internacia parto de Tanĝero (Tangier), kiu havas direktablajn antenojn al Norda kaj Suda Amerikoj. La lingvo-problemon oni povus solvi per alternaj dissendoj en diversaj lingvoj. Oni ankaŭ pripensas la enkondukon de 'Baza Angla' aŭ de Internacia Helplingvo!" Ni forte konsilas ke ĉiu Esperantisto skribu leteron, altkvalitan kaj dignan, al la iniciantoj de tiu projekto ĉe la supraj adresoj en London, England, kaj sugestu la uzadon de la vivanta interlingvo Esperanto.

★

Rita Beukema Martinez, sperta Esperantistino kaj konata organizinto de la Esperanto-Grupo en Grand-Forko, Nord-Dakoto, skribas de Vaŝintono (kie ŝi deĵoras en registaro-laboro). Ŝi informas ke ŝia parenco, H. J. Bulthuis, mondfama Esperanto-verkisto en Nederlando mortis antaŭ kelkaj monatoj sub la Germana regado. La Germanoj forprenis ĉion de S-ro Bulthuis, kaj forĵetis lin el lia hejmo je la aĝo de proksimume 80 jaroj. Tiu frapoj sendube kaŭzis la morton. Esperanto perdis tre gravan verkiston en tiu milit-tempa morto.

★

Nellie Monte Gill, de Montpeliero, Vermonto, kiu multe kaj efike propagandis Esperanton en antaŭaj jaroj, havas la simpation de ĉiuj Esperantistoj pro la morto de sia edzo antaŭnelonge.

NORMAN H. FROST, pioniro de la Esperanto-Societo de Bostono, mortis frue en 1945. Li estis la klera redaktoro de Amerika Esperantisto 1918-22, kaj eldonis libron, "Spoken Esperanto," in 1922. Li ĉeestis Kongreson en La Hago 1920. Reokazo de nerv-malsano devigis lin forlasi aktivecon, kaj liaj lastaj jaroj pasis en la Ŝtata Malsanulejo ĉe Aŭgusto, Majno (Augusta, Maine).—G. Winthrop Lee, nuna Prezidanto de la E.S.B. raportis tiun malfeliĉan novaĵon.

ROGER GOODLAND, alia pioniro de la E.S.B., mortis en Sud-Afriko en Decembro 1944. Li estis kapricema sed aminda Anglo kiu bone servis kiel Sekretario de E.S.B. dum kelkaj jaroj. Li faris multon por ordigi la Espo-kolekton ĉe la Publika Libraro de Bostono. Dum la Unua Mond-Milito li servis en la Kanada Armeo, kie li malsaniĝis pro venena gaso. Li neniam plene resaniĝis. Je reveno al Anglujo li ricevis heredaĵon kiu ebligis lin multe vojaĝi. Poŝtkartoj de Sud-Ameriko, Azio, Oceanio, kaj aliaj vojaĝ-restejoj, atestis pri lia vojaĝemo. Raportis G. Winthrop Lee.

CHAS. H. HUNTER, longtempa kaj fervora ano de la Esperanto-Societo de Oklahomo-Urbo (ESOC) subite mortis de kor-malsano, la 18-an de Marto, je la 66-a jaro. Unu plejlasta ago lia estis artikolo pri Esperanto en la loka tagjurnalo. Li unue studis Esperanton antaŭ 25 jaroj, kaj estis fonda membro de ESOC. Li estis en la Publikiga Komitato de EANA, 1940-41. (Raportis Bernice X. Rayburn.)

PETER REILLY, pioniro-Esperantisto de Filadelfio, Pensilvanio, mortis la 27-an de Junio en sia libredo. Li estis Kasisto de la Asocio de Libro-Vendistoj dum 20 jaroj. Li estis libro-vendisto dum 45 jaroj.

EL ESPERANTO-LANDO

El la Belga Armeo, en kiu li milit-servas, Soldato Fons Norro skribas: "Via revuo, *Amerika Esperantisto*, estas tre bela. Mi vivas nun kun anglaj soldatoj en la RTO-ejo en Bruĝo. Mi faras propagandon por Esperanto kaj mi estas konvinkita, ke via revuo min ege helpos en tia laboro. Saluton al la tuta Amerika Esperantistaro el Bruĝo, urbo de arto kaj de kontraŭstaro al la malamikoj de Esperanto!"

Letero-papero kun Esperanto-Moto estas presita de nova Esperantisto, kiu volonte sendos informon kaj prezaron al interesatoj. *Homer R. Hansen, Middletown, Conn.*

S-ro Aug. P. Heimann, de El-Dorado, Kanso (Kansas), daŭre subtenas kaj propagandas Esperanton, kvankam li estas nun 85-jara.

Prof. J. F. Clewe, Los Angeles, lerte organizas traduk-projekton pri grava literaturo de la eklezio Kristan-Scienco. Kredantoj de tiu eklezio bonvole skribu al la Centra Oficejo pri ebla kunlaboro.

Parolante pri la prelegoj de nia kunredaktisto, D-ro W. Solzbacher, ĵurnaloj kaj organizaĵoj ofte atentigas pri lia Esperanto-laboro. Tion faris ekzemple "Talent," organo de International Lyceum Association, kaj "Program," organo de American Platform Guild, du fakaj organoj pri prelegoj kaj prelegistoj, kaj ankaŭ anoncioj pri D-ro Solzbacher disvastigitaj per Roxanna Wells Lecture Bureau en Nov-Jorko kaj Open Forum Speakers Bureau en Bostono. La programo por 1945/46 de la famkonata Serio de Kristana Kulturo en Windsor, Kanado, anoncas prelegon de D-ro Solzbacher por la 25a de Novembro, prezentante lin kiel "aŭtoritatulo pri Esperanto, Internacia Politiko ktp."

El Aŭstralio F. R. Banham, redaktisto de "La Rondo," skribas: "Pastro Gabriel Pausback ageme propagandis Esperanton, dum kiam li loĝis en nia lando, aperigante du, tri artikolojn en katolikaj organoj en Brisbane."

Jas. H. Morrison, Oakland, Calif., sendas novajn abonojn al "AE," kaj priskribas efikan propagand-ideon. Li alĝuas folieton pri Esperanto en jam legitajn numerojn de "Reader's Digest," ktp, por donaci al kluboj kaj centroj de la Ruĝa Kruco, ktp.

S-ino Marion S. Alderton, 909 Channing Ave., Palo Alto, Calif., sendas helpemajn eltranĉaĵojn pri Esperanto, kaj informon pri sia klopodado en ekonomia kaj socia aferoj.

Nia EANA Vic-Prezidanto Robert Karlson, multe laboras por revigligi la Esperanto-movadon en Kanado. Li presas multajn propagandilojn, inter kiuj estis represaĵo de "Esperanto Confers Gift of Tongues" de Pastro Pausback.

"*Esperanto estas preta por servi*" estas la moto de la vigla Esperantoklaso en Miamo, Florido. Sub simila titolo aperis longa artikolo pri Esperanto en la *Miami Daily News*, 17-an de Junio. D-rino Lydia Allen DeVilbiss kaj David Earl estas la gvidantoj de tiu bona vigleco por Esperanto en Miamo. D-rino DeVilbiss unue parolis pri Esperanto antaŭ la Panamerika Ligo, kiu havas 267 filiojn en Usono, kaj de tio rezultis 25 studentoj por la Esperantoklaso. Inter la klasanoj estas diversaj instruistoj kaj unu Ĉina leŭtenanto.

F-ino Ann Beatty, konata kaj amata Esperantistino de Kardintono, Ohio, decidis ke ŝia domo bezonis novan kolorigon. Ŝi ne trovis laboristojn por fari la laboron, do ŝi mem faris ĝin. *Kaj ŝi estas nur 87-jara!*

ESPERANTO-KRONIKO

Ce la Strata Fin' estas la nomo de la domo de S-ino D. B. Fuller en Framingham, Masaĉuseto (Framingham, Mass.). Ŝi havas grandan kolekton de esperantaĵoj kaj ofte invitas soldatojn kaj aliajn por vidi ilin. En Junio, *The Boston Daily Globe* publikigis leteron de ŝi pri Esperanto.

Doris Saville, Vancouver, B. C., jam gvidis kursojn en Vancouver Business School, sed nun priplanas eĉ pli gravan kurson sub la konsilantaro de edukado, en la publikaj lernejoj vespere. F-ino Saville sendis bonan liston de Kanadanoj kiuj aprobas la novan EANA kaj AE, nome: *R. Busschaert, Jessie Forrest, S-ino Etta Haar, M. Knoblock, Rae Perran, Catherine Wilson*. Ni tre dankas al ĉiuj.

F-ino Roan Orloff, multe preparolis Esperanton dumsomere antaŭ grupoj en Maywood, Ill.; Ann Arbor, Mich.; Saline, Mich.; Green Acre Bahai School, Eliot, Maine; i.a. Ŝi flugis al Wilmette, Ill., kie ŝi multe paroladis. Ni esperas verki pli detalan novaĵon en sekvonta numero.

A. F. Bedford, 50 Central Ave., Hillsdale, N. J., vizitis la Centran Oficejon. Li nun estras filatelian kompanion, "Green Star Stamp Company," kiu pogranda kaj pomalgrande, profesie kaj amatore, negocas pri poŝtmarkoj. Skribu al li por plena informo, kaj filatelia negocado.

Betty kaj Harold Ewen anoncas la naskigon de filo, *Carl Benjamin Ewen*, kiu komencis sian Esperantistan (!) vivon je la 4-a de Aŭgusto.

Leŭt. Sam E. Martin, USNR, sendube troviĝos en la "Lando de la Leviganta Suno" (nun 'suno' iom nuba kaj duba!) Ni tion opinias ĉar li multe kaj lerte studis la lingvon de Niponlando. Se jes, ni espereme atendas novaĵon pri Esperanto tie.

Bildkartoj pri la studejo de Mark Twain kun Esperanto-teksto baldaŭ eldoniĝos pro la bona laboro de Elmira Esperanto-Klubo, Elmira, Nov-Jorko.

Kaporalo Johano Lillevold skribis el la Filipinaj Insuloj: "Mi trovis malgrandan Japanan vortaron, kiu favore menciis Esperanton, kaj mallonge difinis Volapukon kiel mortintan projekton—kaj tio estas rekta. La Japanoj estas inteligentaj en almenaŭ unu rilato!"

Vundita Esperantisto Leŭt. R. C. Marble revenis al Usono kaj nun estas en malsanulejo en Kalifornio. Antaŭe li loĝis en Seattle kaj Kansas City. Ni sendas al li koran saluton de la tuta Esperantistaro kaj esperon por lia baldaŭa resaniĝo.

D-ro Norman A. McQuown nun troviĝas en la Kolegio 'Hunter,' Nov-Jorko, instruante la Rusan lingvon laŭ la plej nova metodo de instruado uzita en la armeo. D-ro McQuown estis grava estro por la aplikado de tiu metodo en la armeo, kaj liaj kursoj en 'Hunter' celas por instrui samtempe la metodon kaj la Rusan lingvon.

S-ro J. H. Holding estas la Ĉef-agento en Usono de la Internacia Asocio de Poŝtmark-kolektantoj. La organizo celas al la aĉetado kaj interŝanĝo de poŝtmarkoj inter la membraro tutmonde. Skribu al *J. H. Holding*, 2647 W. Adams St., Chicago, Ill.

Howard E. Latham, poŝtestro, Kaledonio (Caledonia), Nov-Jorko, kiu dum la milito servis en Grenlando, nun denove studas Esperanton, kaj faras mirindan progreson sen ia Esperantista kontakto. Li volonte helpas pri Esperanto por Skoltoj, kaj estas Skoltestro en sia urbo. Li pretigas sin por instrui Esperanton.

PUBLICITY ! ARE WE EQUAL TO THE CHALLENGE?

To the Editor of *American Esperantist*:

If the Esperanto movement will ever make significant advance, it must certainly do so now. Never before have people been as much concerned with international problems, and the events that are taking place will determine the course of world affairs for many years to come. Every proper effort made now, it is apparent, will bear many times the harvest it would at some less opportune time.

Must it always be a matter of too little and too late? As things stand now the Esperanto movement in America is almost unable to seize the opportunity. Publicity is at a minimum; excellent opportunities arise and are allowed to slip by, perhaps not to re-occur; progress is hindered—*because we lack the means to take advantage of the situation.*

It is clear that if we are to make the most of present favorable circumstances we must have *an adequate working fund*, the absolute essential to successful action. And what can we consider an adequate fund? Certainly nothing less than *One Thousand Dollars* can be acceptable. Any smaller sum would be mockery of the stature of the Esperanto movement.

In response to your appeal for contributions to the *Publicity Fund*, I sent you two dollars, believing that in my present straitened circumstances that was all I could afford. On further consideration, however, I realize that this is a short-sighted outlook, since money properly used now has many times its value in terms of effect. Therefore, if you will undertake this project, I will contribute \$25 toward the \$1000 working fund, as soon as five other friends of the Esperanto movement indicate that they are willing to do the same.

It is customary in raising funds to give all sorts of pep-talks and exhortations. In this case the need is so evident that pep-talks should be unnecessary. It remains only to be seen whether we Esperantists in America are equal to the challenge of the opportunity.

Samideane via, HAROLD EWEN

P.S. I further suggest that for a fund of such a special nature the minimum acceptable contribution be five dollars, so that the proper level of income may be established.

Who Will Be the First to Match Harold's Contribution?

The Editor of *American Esperantist* proposes that all who contribute \$25 or more to the General Publicity Fund be organized into a *Publicity Advisory Committee*. Many may be able to give more than \$25. We know that \$25 is a real sacrifice for Harold, and we are particularly pleased to begin this *One Thousand Dollar Campaign* with his letter and donation. Let us all dig deep for an effective Fund.

Although Harold suggests a \$5 minimum, we will be grateful for lesser sums. Small sums will be pooled in official tabulations. Here are the figures for the past two months: Charles Ramsay, \$8; Wm. G. Adams, \$5; Mrs. Jewell Bainbridge, \$5; Pvt. Ted Crawford, \$5; Bernice Rayburn, \$5; Howard E. Latham, \$5; R. C. Marble, \$4; Aug. J. Heiman, \$2; David Ericson, W. T. Williams, Wm. Knox, George Gaber, Eldred Lowe, each \$1.

DEZIRAS KORESPONDI

Anoncetoj pri korespondado el Usono kaj Kanado kostas 25 cendojn por 4 linioj. El aliaj landoj, de kie estas nun malfacile sendi monon, AE akceptas anoncojn senpage. La redaktisto rezervas al si la rajton fini tiun privilegion je iu tempo.

Usono. S-ro J. H. Holding, 2647 W. Adams St., Chicago, Illinois. Dez. kor. kun seriozaj PM kolektantoj kaj negocantoj ekster Usono. Afranku filatele kaj aerpoŝte.

Usono. Eugene T. Lake, 219 Central Ave., Cranford, N. J. Ŝipdesegnisto, kiu estas petata por verki libron pri ŝipoj kaj boatoj, dez. kor. pri ŝipoj de aliaj landoj, precipe pri tiaj ne uzataj en Usono kaj Eŭropo.

Usono. S-ro Arthur Bedford, 50 Central Ave., Hillsdale, N. J. Dez. kor. kaj interŝ. PM amatore aŭ profesie kaj pogrande.

Usono. S-ro Noble Holderread, Milford, Indiana. Dez. kor. kun Australio, interŝ. PM.

Usono. Alan Samuel, 284 Eastern Parkway, Brooklyn, N. Y. 13-jara skolto dez. kor., interŝ. PM tutmonde.

Franĉujo. J. Govaert, 64 Rue Bon Secours, Compiègne, Oise. Dez. kor.

Franĉujo. S-ro Bochon Michel, 10 Quai Ste. Claire, Romans (Drome). Dez. kor. por sia Esp-o klaso.

Brazilo. Prof. Roberto das Neves, Esperanto Klubo de Kristana Asocio de Junuloj, Str. Araujo Porto Alegre 36, Rio de Janeiro. Grupo de 120 Esp.-istoj, 17-jara ĝis 59-jara, plejparte Universitat-studentoj, dez. kor.

Senegal. Michel Kåbore, Marin sur le bateau "Jupiter," Dakar.

Belĝujo. Soldato Fons Norro, No. GCT/2-106, 2nd Belgian M. C. Group, Belgisch Leger te Velde. Dez. kor. pri arto, literaturo, muziko, fervoj, vivo en Ameriko kun geesp-istoj.

Belĝujo. F-ino Marie-Louise Senave, Vestingstraat 44, S-ta Kruco, Brugge. Dez. interŝ. il. PK.

Belĝujo. F-ino Germaine Mallet, Assebroeklaan 43, S-ta Kruco, Brugge. Dez. kor. kun geoficistoj.

Aŭstralio. S-ro F. M. Cave, Pomona, Queensland. Dez. kor. tutmonde, interŝ. PM kaj monerojn.

Irlando. S-ro Patrick Harding, Grange of Mallusk, Carnmoney, Co. Antrim. Dez. kor. pri historio de Irlando, Franĉujo, Hispanujo, Skotlando, kaj pri ĉiutaga vivo en Quebec, Centra Ameriko, Sud-Ameriko.

Italujo. Torina Esperanto-Grupo, Casilla Postale 161, Torino. Dez. kor.

Skotlando. G-te Leons Kielpinski, Polish Forces P. 64A (K.U.) Edinburgh, pola militisto, dez. kor.

Anglujo. Herbert J. Brown, 6 Church St., Barton Hill, Bristol 5, 15-jara, dez. kor. kun ĉiuj landoj.

Nov-Zelando. S-ino J. M. Hooper, R. D. Makerau, via Kaukapakapa, Northland; farmist-edzino, pianistino, dez. interŝ. PM.

Svedujo. S-ro Karl Erik Karlsson, Uplandsgatan 69, 1tr., Stockholm, 20-jara, dez. kor. kun fraŭloj kaj fraŭlinoj pri lingvoj, sportoj, filmoj, teatraĵetoj, ktp.

Franĉujo. S-ro Marc Vermynck, Avocat, 2 Rue Godefroy-de-Bouillon, Clermont-Ferrand. Dez. kor. kun Usonaj advokato aŭ jurstudento.

Belĝujo. S-ro Gilbert Bruyned, Vlamingdam 121, Brugge. Dez. kor. kun studentoj pri televido.

Senegal. Jean-Marie Kone, a la D.P. "Machines," Poste Nawal, Dakar.

Nov-Zelando. Cyril Brandon, 16 Wairiki Rd., Mt. Eden, Auckland S. 1. (elektro-inĝeniero) dez. kor.

Belĝujo. F-ino Rose-Anne Roose, Guido Gezellelaan 15, Brugge. Dez. kor. kaj interŝ. il. PK.

Franĉujo. S-ro Robert Magne, 14 Rue d'Isly, St. Etienne (Loire). Dez. kor. kun ĉiuj landoj.

ESPERANTO BOOKS

Uncertain transportation makes it difficult to get books from Europe or South America, and our orders are filled in small lots. If your order is not filled within 48 hours, it is because we are waiting for shipments.

- PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Ivy Kellerman-Reed. A favorite all over the world for many years. For class or self-instruction .75c
- ESPERANTO HOME STUDENT, by James Robbie. Splendid for class or self-study. Pocket size and a favorite with the service men in camps .25c
- PRACTICAL ESPERANTO, by Wm. S. Benson. For self-instruction. It is unique with its 650 illustrations .25c
- UNIVERSALA ESPERANTO METODO, by Dr. Wm. S. Benson. This book is a wonder. "The only book of its kind in the world." 11,000 pictures. Two full-page tables of the pronunciation of the Esperanto alphabet in 36 languages. Correlatives in 35 languages. Complete index. 555 pages \$3.50
- AMERICAN POCKET DICTIONARY, by Carl Froding. 80 pages of Esperanto-English and English-Esperanto. An indispensable little pocket companion .30c
- ESTU PRETA, by George J. Falgier. A splendid *key*, with grammar, and considerable fundamental teaching .10c
- "LA ESPERO," Esperanto Song. Words and Music. Double sheet 8 x 11. Every Esperantist should have it. Sung at all Esperanto meetings .15c or 2 for .25c
- "LA VOJO." Esperanto Song. Single sheet. With translation. .10c or 3 for .25c
- EDINBURGH DICTIONARY. A world favorite. English-Esperanto and Esperanto-English. 288 pages \$1.00
- STEP BY STEP IN ESPERANTO, by M. C. Butler. One of the world's best. Paper covers .75c
- MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. Latest edition, 1945. \$3.50
- STARS. No more of the metal stars, advertised in some text-books, due to priorities.
- INDIAN BEAD STARS, white bead background with green star in center .45c
- HOME STUDENT RECORDS—made in Europe. No more available.
- "LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.00. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto) \$1.25
- "ESPERANTO INTERNACIA", by Ann E. Beatty. Over 300 hymns, original Esperanto and translations of well-known English hymns .45c

YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist". \$2.00 per year. And if you also wish membership in the International Esperanto League, with the *Jarlibro* (Yearbook Encyclopedia of Esperanto Activities), \$3.00. For the "Esperanto Internacia" (all-Esperanto official organ of I. E. L.) add \$1.00 to either of these memberships. Total for all above, \$4.00.

I..... Date.....

apply for membership in the Esperanto Association of North America, and enclose subscription (indicate class and amount)

.....

.....

ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

Esperanto is not an academic project. It is the living interlanguage already in world-wide use for interchange of thought between peoples with different national languages. It is auxiliary to their mother tongues.

The official 'Declaration on Esperanto,' World Congress, Boulogne-sur-Mer, states: "Because at the present time no investigators throughout the world any longer doubt that an International Language can be other than a constructed one, and because out of the great number of attempts made during the past two centuries, all present only theoretical projects, and only one language, Esperanto, has shown itself to be a language really completed, thoroughly tested from all sides and capable of life in all circumstances, for that reason supporters of the idea of an International Language, realizing that theoretical discussion will lead to nothing and that the end in view can only be attained by practical work, have already grouped themselves around the single language, Esperanto, and are working for its dissemination and the enrichment of its literature."

Many competent investigators have come to the same logical conclusion. Dr. Bjorn Collinder, one of the most distinguished linguists of modern times, states this conclusion as follows: "If one asks me in what manner the world-language problem is to be solved, I respond: 'It has already been solved in Esperanto. The problem is merely one of bringing about the acceptance of the solution by those who are in power.'"